

N° 06 1966


G.L. GIMELLI


# ITALA fervojisto

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti









IFEA

## BONDEZIROJ

OKAZE DE LA PROKSIMAJ FESTOJ, KUN VARMA KORO, LA ESTRARO DE ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO (I.F.E.A.) KAJ LA REDAKCIO DE "ITALA FERVOJISTO", FRATE BONDEZIRAS FELIĈAN KRISTNASKON KAJ PROSPERAN NOVJARON AL ĈIUJ MEMBROJ KAJ SIMPATIANTOJ DE NIA ASOCIO. NI SENDAS KORAJN BONDEZIROJN ANKAŬ AL LA ESTRARO DE LA INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO FEDERACIO KAJ AL LA TUTA ANARO KAJ LEGANTARO EN ĈIUJ LANDOJ.

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

## AKTIVAĴOJ DE ITALAJ FERVOJISTOJ = INAŬGURO DE ESPERANTO-KURSO

Dimanĉon matene la 16-an de oktobro je la 10 horo en la salono de "Dopolavoro Ferroviario" de Porretta Terme, okazis esperanto-manifestacio por la komenco de la kurso de Internacia Lingvo, organizita pere de la kultura sekcio "Esperanto" de tiu Dopolavoro kunlabore kun Itala Fervojista Esperanto-Asocio kaj kun la Bologna Esperanto-Grupo "A.Tellini". La okazintaĵo estis propagandita pere de grandformataj kaj verdkoloraj afiŝoj, eldonitaj de la kultura sekcio Esperanto kaj de la "Azienda Autonoma Cura e Soggiorno".

La manifestacio havis la ĝojigan ĉeeston de nia Prezidanto D-ro Adv. Stoppoloni kiu venis tiuokaze de Pistoia kun la gvidanto de la kurso Prof. Landucci. Gastigis nin la "Dopolavoro Ferroviario" de Porretta per ĝia Prezidanto: Supera Staciestro Domenico Buscaroli; ĉeestis la Komunuma Sekretario, kiu reprezentis ankaŭ la Kuracan, Restadejan kaj Turisman Entreprenon, la Paroĥestro, la Lernejestro de la loka Liceo, la ĉefo de la loka Fervoja Polico, la Direktoro de la lokaj kurac-varmbanejoj, kaj aliaj eminentuloj.

La pli ol tridek gekursanoj aŭskultis atente la sekretarion de I.F.E.A. S-ro Gimelli kiu dankis la D.L.F. de Porretta kaj skizis rapide la preminentan postenon kiun okupas la fervojistoj en la Esperanto-Movado. D-ro Stoppoloni parolis pri Esperanto ĝenerale kaj pri atingaĵoj de nia movado en lastaj tempoj. Li finis per lastaj informoj pri la evoluo de la Leĝprojekto n-ro 1816 kies aprobo ĉe itala parlamento bonege marŝas.

Fine Prof.Casagrande, kiel dua gvidanto de la kurso, venis al la kerno de la manifestacio donante la unuajn klarigojn pri la lingvo Esperanto.

Poste kune kun la Prezidanto de D.L.F. S-ro Buscaroli kaj de la Sekretario S-ro Beltrandi, oni aranĝis la teknikajn problemojn de la kurso, kiu okazos ĉiusabate de la 17,30 h. ĝis la 19,30 h.. Ĉiumerkrede la gekursanoj renkontiĝos por la disvolvo de la taskoj kaj relegi la faritajn lecionojn.

Jen nova semo de nia movado ĵetita en Porretta Terme, danke al la senlacaj klopodoj de s-ano Pivari kiu eklernis Esperanton en Bologna ĉe la Profesia Lernejo de Centra Stacidomo de Ŝtataj Fervojoj.

## INAŬGURO ESPERANTO-STRATO EN ALBENGA

Dimanĉon la 23-an de oktobro 1966-a, okaze de la inaŭguro de Esperanto-Strato, disvolviĝis en Albenga (Provinco Savona), Esperanta manifestacio kiu tre impresis jen la loĝantaron de la simpatia urbeto, jen la mult nombrajn partoprenantajn Esperantistojn.

La tago komenciĝis per la inaŭguro de la flago de la loka Esperanto-Grupo Ingauno, fare de Lia Moŝta Episkopo, kiu, per trafaj kaj taŭgaj vortoj evidentigis la valoron de nia movado kaj de Internacia Lingvo.

La Esperanta Diservo okazis en la malgranda placo de Lionoj, juvelo de la antikva "Albium Ingaunum"; tie, unu post la alia, laŭvice, troviĝas la malantaŭa parto de la Katedralo, la mirinda Baptejo, la Episkopejo kaj aliaj belegaj konstruaĵoj kiuj igas tiun placeton kiel centron de la antikva kaj karakteriza parto de la urbeto. La Religia Ceremonio emociigis nin ĉiujn, aŭ pro la sugesta loko aŭ pro la belegaj vortoj de la tute

novbakita Esperantisto: Tre Respektinda Kanoniko, Pastro Prof-ro Borzachiello, kiu bonege Diservis kaj predikis Esperante.

Poste en la salono de la malnova komunuma Palaco, prezentata de nia kolego Corradi, staciestro de Albenga kaj Prezidanto de la Esperanto-Grupo Ingauno, D-ro Mario Dazzini, majstre kaj flame prelegis pri: "Esperanto en la lernejoj". Ĉeestis inter la aŭtoritatuloj, la Vic-Provincestro el Savona Komm.Capellini kaj la Urbestro de Albenga S-ro Viveri.

Sekvis la inaŭguro de tute nova "Strato Esperanto" en moderna kvartalo; post la malkovro kaj beno de la tabuloj la Urbestro per taŭgaj kaj sinceraj vortoj dankis aŭtoritatojn kaj esperantistojn, kaj bondeziris al nia movado.

Rimarkinda estas la fakto ke en Albenga okazis la unua eksperimento, kun bonegaj sukcesoj, por enkonduko de Esperanto en la elementaj lernejoj kaj ke baldaŭ oni inaŭguros esperantan kampadejon kaj nomos ĝin "Esperanto de la Floroj".

Dum la inaŭguro de la strato, ĥoro de knaboj de la elementaj lernejoj kantis esperantajn kaj religiajn kantojn sub la gvidado de la senlaca Kan. Prof-ro Borzachiello.

La luksa refreŝigaĵo regalita de la Komunuma Administracio en la salono de la Malnova Palaco kaj la komuna tagmanĝo finis la unuan parton de tiu bela tago.

Posttagmeze aŭtobuŝa ekskurso kondukis la partoprenintojn viziti la proksimajn mirindajn grotojn de Toirano; poste la adiaŭoj kaj forveturo.

La Esperantistoj de Albenga, inter kiuj kelkaj fervojistoj, povas fieri pro tiu sukcesplena manifestacio; imitinda ekzemplo de lerta organizado de la tuta aranĝo kaj de favora partopreno de la publiko neesperantista.

## DISDONO DE LA DIPLOMOJ AL GEKURSANOJ EN BOLOGNA

En Bologna, duobla signifa solenaĵo okazis dimanĉon la 30-an de oktobro, pro iniciato de Esperanto-Grupo kaj de la loka U.N.M.S. kun la ĉeesto de Vicministro pri Publika Instruado, On.Elkan, kaj de aliaj aŭtoritatuloj.

Je la 11-a horo, Prof-ro C.Agostini (Ĝenerala Direktoro de Itala Instituto de Esperanto), akcentis la valoron de Esperanto kaj disdonis la diplomojn pri lingvo Esperanto al gekursanoj de la pasinta lernojaro al kiuj li adresis patrajn kaj kuraĝigajn vortojn por instigi ilin lerni dum la novaj kursoj. Prof-ino Dalla Valle en la nomo de lernejestrino Prof-ino Capponcelli anoncis la daŭran organizon de Esperanto-Kursoj ĉe la Ŝtata Mezgrada Lernejo "Guido Reni" kaj la donacon de monsumoj al gelernantoj de la nunjaraj kursoj. Parolis poste, en la nomo de Itala Esperanto-Federacio, D-ro Dazzini, kiu, inter alie, informis ĉiujn gelernantojn kaj la ĉeestantojn-neesperantistojn pri la Leĝpropono 1816 koncerne la enkonduko de Esperanto en la lernejoj. Fine Fino Casagrande anoncis je la nomo de junulara sekcio, premiojn (abonoj al junularaj revuoj) al la plej lertaj diplomatoj, kiuj ricevis tondrajn aplaŭdojn.

Je la dekdua kaj duono, en la preĝejo de Sanktaj Gregoro kaj Siro, kun la oficiala ĉeesto de la Vicministro On.Elkan, Patro Ciccanti Diservis la Sanktan Meson en Esperanto, je memoro de la mortintoj dum la plenumo de ilia laboro por defendo de Patrujo. La celebranto legis esperantlingve la Epistolon kaj Evangelion kaj komentariis, per simplaj vortoj en Esperanto la feston de Kristo Reĝo, kaj la gravan signifon de tiu Sankta Meso.

En la apuda salono de la parokejo dum simpla honora vermuto, Lia Moŝto On.Elkan, interparolis kun la aliaj aŭtoritatuloj pri la gravaj problemoj de "Alto Adige", pri paco, pri harmonio kaj interkunlaborado kiuj povus esti faciligitaj pere de la Internacia Lingvo Esperanto. Rilate al ĝi, respondinte al la vortoj de Prof-ro Agostini kaj de D-ro Dazzini, kiu donis al li kolekton de dokumentoj pri Esperanto, On.Elkan deklaris sin preta apogi nian lingvon kaj precipe ties enkondukon en la italajn lernejojn kiel jam okazis en multaj landoj de Eŭropo kaj de la mondo, kaj promesis helpon al nia movado kaj sian apogon al Leĝprojekto n-ro 1816.

## ĜENERALA JARKUNVENO DE FRANCA FERVOJISTA ESPERANTO-Asocio F.F.E.A. EN PARIZO

Jam sabate matene la 26-an de novembro je nia alveno ĉe "Gare de Lyon", atendis nin nia amiko Coyac. Samtempe kaj en la sama vagonaro alvenis en Parizo la I.F.E.F.-Prezidanto S-ro De Jong kun la edzino. Post malgranda refreŝigaĵo en la stacia bufedo ni atingis la bone konatan hotelon "Felix".

Posttagmeze majstre gvidata de S-ino Bernier, la internacia rondeto promenis tra la urbo, ĉu per subtera fervojo ĉu per boato sur la rivero Sejno. Post akurata vizito al "Caves de la Tur Eiffel" kaj komuna vespermanĝo ni atingis la salonon de 11 Rue de Milan, kie kunvenis multnombre la gekolegoj por partopreni la amuzan vesperon bonege organizita de la senlacaj junuloj de la Pariza grupo. La plej junaj, kaj ankaŭ kelkaj nejunaj geamikoj finis la vesperon per vizito al Montmartre-kvartalo, ĝis la malgrandaj horoj de la posta tago.

Tamen dimanĉe matene ĉiuj akurate plenigis la salonon de la centra sidejo de "Union Artistique et Intellectuelle des Cheminots Francais" por la jarkunveno, kiu komenciĝis per salutvortoj de la Prezidanto de F.F.E.A. amiko Delaquaize, de la Reprezentanto de U.A.I.C.F. kaj de la Prezidanto de I.F.E.F. kolego De Jong. Krom la reprezentantoj de aliaj landoj, ankaŭ la sekretario de I.F.E.A. Gimelli, alportis la salutojn de la italaj kolegoj kaj mallonge parolis pri lastaj novaĵoj de nia movado en Italujo. S-ro Delaquaize raportis pri la laborkunsido de la antaŭa tago kaj anoncis la elekton de Avignon kiel kongresurbo de la 21-a I.F.E.F.-Kongreso en 1969-a kaj de Nantes kiel ebla loko de la venonta Ĝenerala Jarkunveno de F.F.E.A.

Post longa diskutado al kiu partoprenis preskaŭ la tuta ĉeestantaro ni atingis, en Place de Clichy, la restoracion kie okazis luksa kaj bonhumora bankedo.

La itala delegacio finis la vesperon en la hejmo de Madame Thierry, kie gastigis nin en familia atmosfero, S-ro Thierry kaj patrino.

Lundo la 28-an de novembro, lasta de nia restado en Parizo, ni vizidis la urbon kaj la grandajn magazenojn ĉiam akompanataj de F-ino Lemonnier kiu klarigis kaj helpis nin.

## BRILA JUBILEA JARKUNVENO DE GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

### En Uelzen renkontiĝis 100 esperantistoj el 4 landoj

La 1-a Jarkunveno de la Germana Esperanta Fervojista Asocio (G.E.F.A.) okazinta de la 15-a ĝis la 16-a de oktobro 1966 pasis sukcesplena. Niaj germanaj kolegoj kun gastoj el Danlando, Francio kaj Nederlando travivis denove du agrablajn tagojn en la nordgermana urbeto Uelzen.

La brila sukceso de la manifestacio oni ŝuldas al S-ro Heimlich, komisiito por Esperanto en la fervoja distrikto Hannover, kun la edzino, kiuj tiel streĉe kaj modele prizorgis la aranĝojn. (El BULTENO de G.E.F.A.)

## JARKUNVENO 1966 DE ESPERANTA SOCIETO FINLANDAJ FERVOJISTOJ

La jarkunveno 1966 de E.S.F.F. okazis la 24-an de marto en stacidoma klubejo "Toimela" en Helsinki. Oni reelektis la ĉefajn funkciantojn, aprobis la jarraporton kaj kontoraporton, bilancojn kaj budĝeton por la kontjaro 1966. Por la venonta agado kelkaj sugestoj estis farataj. Por pliboniĝo de la financoj de la societo oni klopodos aranĝi loterion, verŝajne en 1967. (El Raitis Rautatieläinen-Gazeto de la Finlandaj Fervojistoj)

## PRIVATA AŬDIENCO DE LA PAPO AL DU JAPANAJ GEESPERANTISTOJ

S-ino Yosi Suzumori kaj S-ro Kinsuke Itoo la 7-an de septembro estis akceptitaj en privata aŭdienco de la Papo Paŭlo VI, al kiu ili transdonis specialan mesaĝon de la majstrino de Oomoto, S-ino Nao Deguĉi, kies teksto estis en japana lingvo kaj en Esperanto. S-ro Itoo parolis al la Papo pri la Universala Kongreso en Budapeŝto. Je la fino de la aŭdienco la Papo donacis al ambaŭ memormedalon.

(El Heroldo de Esperanto)

## 19° CONGRESSO DELL'I.F.E.F. (FEDERAZIONE INTERNAZIONALE FERROVIERI ESPERANTISTI), A FULDA (GERMANIA) DA SABATO 6 MAGGIO A VENERDI 12 MAGGIO 1967. ULTIME NOTIZIE PER I PARTECIPANTI ITALIANI:

Allegato troverete l'"Aliĝilo-Ĉambromendilo" per il 19° Congresso dell' I.F.E.F. a Fulda. Per partecipare a detto Congresso é necessario inviare subito il modulo compilato, o direttamente al Comitato Organizzatore o al segretario dell'IFEA, accompagnandolo in ogni caso almeno coll'importo della quota di adesione al Congresso che é:

- Fino al 31 dicembre 1966: marchi tedeschi 26, fino al 15 marzo 1967: marchi tedeschi 32, fino al 20 aprile 1967: marchi tedeschi 38.

Per i pensionati, le mogli e i giovani, fino ai 19 anni di età, le somme suddette sono la metà, cioé rispettivamente marchi 13, 16 e 19.

Indirizzo del Comitato Organizzatore: 19-a I.F.E.F. kongreso, postfako 700746, D-6 FRANKFURT (Main) 70 Germanio.

Nel caso si inviino le quote al segretario dell'I.F.E.A. sul Conto Corrente Postale n° 8/24094, calcolare 170 lire italiane per ogni marco ted.

## N E K R O L O G O J

Hispanujo: La 28-an de septembro Hispana Esperanta Fervojista Asocio (HEFA) suferis la doloron perdi unu el siaj plej entuziasmaj membroj, S-ro Sergio COLS. Ni konis lin en diversaj IFEF-kongresoj: Linz, Aarhus, ktp. En la lasta tempo S-ro COLS estis malsana pro kancero. Li ripozu en paco.

Francujo: La 11-an de oktobro 1966-a mortis post longa malsano, S-ino Louisa BLONDEAUX-BOUTIGNY, edzino de nia kolego André BLONDEAUX gvidanto de la terminara afero en Francio. Al nia amiko BLONDEAUX ni esprimas niajn plej sincerajn kondolencojn ankaŭ je la nomo de liajn multnombrajn italajn amikojn.

Hungarujo: La 24-a de novembro mortis en Budapeŝto S-ro H.TOTH LAJOS, bopatro de nia kara amiko D-ro Pethes Imre, kiu tre zorgis por la Fervojistoj dum la 51-a U.K. Al la kara D-ino Imréné kaj al nia kolego ni esprimas sincerajn sentojn de simpatio.

## I.F.E.F. KAJ F.I.S.A.I.C.

El "LA INTERNACIA FERVOJISTO" ni ĉerpas leteron de kolego Giessner al la IFEF-Prezidanto:

"Estimata Kolego kaj Amiko,
Reveninte de internacia FISAIC-kunveno en Berchtesgaden, kiun mi partoprenis kiel Esperanto-ĉefkomisiito de nia sociala kulturorganizo, mi deziras sciigi al vi kelkajn gravaĵojn, nome: IFEF-kongresoj ek de nun estos konsiderataj FISAIC-aranĝoj, kondiĉe, ke ili antaŭe estos anoncitaj en la FISAIC-aranĝkalendaro kaj ke ili okazos en lando, kiu estas membro de FISAIC. Estas grava tasko de IFEF, sufiĉe frue (en februaro/marto ĉiujare) anonci tempon kaj lokon de la kongreso en la venonta jaro al la ĝenerala sekretario de FISAIC. Mi jam nun atentigas vin, ke Bulgario ne estas membro de FISAIC. La 19-a kongreso jam estas envicigita en la kalendaro flanke de "Bundesbahn Sozialwerk". En Berchtesgaden oni donis al la fervojaj FISAIC-kulturorganizaĵoj de landoj en kiu estontece IFEF-kongresoj estos organizitaj, la rajton, sub certaj kondiĉoj distingi per FISAIC-medaloj meritplenjn IFEF-membrojn, se tiuj apartenas al lando, kiu estas FISAIC-membro. La 19-a kongreso sub aŭspicioj de FISAIC.

Kun tre koraj salutoj, via J.Giessner.

## E S P E R A N T O   E N   L A   R A D I O

RADIO ROMA - ESPERANTO - Casella Postale 320 ROMA (Italia) JARO 1967-a

La dissendoj okazas ĉiudimanĉe de 17,30 ĝis 17,50. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto ; la unua parto al temoj:

JANUARO 1967-a: 2081 dimanĉon la 1-an: Ĉe la sojlo de la nova jaro - 2082 dimanĉon la 8-an: Tra la literaturo - 2083 dimanĉon la 15-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - 2084 dimanĉon la 22-an: Leterkesto - 2085 dimanĉon la 29-an: Kristana mondo.

RADIO ROMA - Esperanto Fako - Redaktoro: L.MINNAJA